**ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2024-10-15 ĝis 2025-01-15.

***Ŝlosilpunktoj: 75-jariĝo de ILEI: festaj eventoj; ILEI-kongresoj – 2025 kaj ontaj; Instruista trejnado en Burundo; novaj projektoj de ILEI "Instruistoj de la Jaro"; ILEI dum VK; EKO disponeblas ĉe la paĝaro de ILEI; Tago de Esperanta Libro; Premio La Torre; universitata agado; IPR kaj JA; kunlaboro kun UEA, ĈRI, FIPLV.***

**Eventoj**

En 2024 ILEI festis sian 75-jariĝon! Speciale por tiu dato estis okazigitaj kelkaj eventoj. La Estraro organizis festan kunvenon okaze de la Zamenhof-Tago kaj Tago de Esperanta Libro la 15-an de decembro kun bunta programo kaj surpriza donaco de ILEI. La programo inkluzivis:

A- Kunlegadon de elektitaj kaj rekomendindaj tekstoj, prezentitaj de ILEI:
1- La "rondiranta rakonto" titolita "Pri viroj kaj kunikloj" (https://www.ilei.info/novajxoj/Tago_de_la_EsperantaLibro2024.pdf kaj
2- Interaga kaj multmedia teatraĵo titolita "1910 " fare de Ĵenja Amis (https://www.ilei.info/novajxoj/parto%20de%201910%20por%20kunlegado.pdf)

B- Specialan proklamon de nova konkurso: "**La Instruistoj de la Jaro**", iniciatita de ILEI kun la valora subteno de TEJO. Tiu ĉi konkurso estas organizita speciale por agnoski kaj honori la elstarajn kontribuojn de niaj instruistoj al la Esperanto-movado.

C- Prezenton de la retejo kaj la Aliĝilo de la ILEI-Kongreso en Beogrado, Serbio 2025.

Ĉ- Anoncon de la surpriza donaco de ILEI!

Aperis la festa numero de EKO (la numero 44 de 2024.12.21) kun mallonga skizo pri la Ligo. Pli detale legu ĉe: https://www.ilei.info/agado/historio.php

Jam 44 EKO-komunikojn – kunajn informilojn de UEA, ILEI kaj TEJO – eblas trovi en la retejo de ILEI : https://www.ilei.info/agado/EKO.php ***Dankon pro tiu laboro al Jozefo Nemeth kaj Stefan MacGill!***

**La Estraro**

La Estraro regule (ĉiumonate) kunvenas Zoome por decidi kaj fari kurantajn aferojn.

**ILEI-Kongreso 2025**

Survojas la preparado de la sekvonta ILEI-kongreso en Serbio, Beogrado. ILEI jam anoncis, ke datoj estis ŝanĝitaj al 19.07-26.07-2024 tuj antaŭ la UK en Ĉehio. Estas ellaborita la ĝenerala

programskemo, la emblemo, la aliĝilo kaj mendilo por loĝado kaj manĝoj. Ĝis la fino de ĉi tiu raportperiodo aliĝis 35 kongresanoj. Jen estas la ligiloj:

Aliĝilo: https://2025.kongreso.org/alighilo.html
Loĝ- kaj manĝ-proponoj kaj prezoj:
https://docs.google.com/document/d/1aCgwc_0KMSzm01r_K2mnw4Lf3x9NlDoMK4HksQ8_aL4/edit?usp=sharing
Loĝmendilo: https://forms.gle/jZLapV81sQhd1PTP8
Retejo - enkonduka paĝo: https://2025.kongreso.org/ (tie, klako al la logoj de ILEI (maldekstre aŭ dekstre sur la foto) gvidas vin al la ĉefa paĝo).

Retejo - ĉefa paĝo: https://2025.kongreso.org/ilei-chefa.html

Aperis la Telegram-grupo pri la kongreso: t.me/Beogrado2025

***ILEI bonvenigas ĉiujn aliĝi al la kongreso por ĝui fruktodonan Esperanto-etoson!***

**Sekvontaj kongresoj**

La Estraro klopodas por okazigi sekvontajn kongresojn. La Prezidanto Ahmad Reza Mamduhi sendis oficialan leteron nome de ILEI kun la propono, kiu nun estas traktata de la Estraro de la koncerna universitato.

**“Interkulture kaj inkluzive” en Beogrado 2024**

Aperis fina raporto pri la seminario, verkita de Radojica Petrović kaj Aranka Laslo.

**Kapabligo**

Sukcesa trejando por indiĝenaj instruistoj okazis en Burundo, Mwaro Provinco, Nyabihanga komunumo ĉe la lernejo Girimbabazi Tujane subgvide de la nova estrarano de ILEI Aimé Patrick Manirakiza. Ĝi okazis de la 23-a ĝis la 28-a de decembro. Patrick prizorgis la instruadon kaj estis ĉefa instruisto kun helpo de du lokaj instruistoj. La alia celo de la seminario estis eniri la burundan eduk-sistemon. ILEI subvenciis 300 eŭrojn por tiu seminario, monhelpis ankaŭ UEA kaj SSB (Scio Sen Bariloj). Spektu filmeton:

https://drive.google.com/file/d/1-JnxOvmo6hqs6Qoee5HK706dsAwU59Jq/view?usp=sharing

**Projektoj**

**Instruistoj de la Jaro – 2025**

Omaĝe al 75-jariĝo de ILEI estis lanĉitaj du novaj konkursoj: “Instruisto de la Jaro” kaj “Juna Instruisto de la Jaro” (kunlabore kun TEJO). Pori ili estis plene ellaboritaj la regularo kaj la anoncoj. La anoncoj estas publikigitaj ĉie. Vidu kaj partoprenu: https://www.ilei.info/
https://www.ilei.info/novajxoj/Instruistoj-de-la-jaro.pdf (la anonco mem)

**Tago de Esperanta Libro (Zamenhofa Tago)**

Sukcese pasis la tradicia Tago de Esperanta Libro (Zamenhofa Tago), por kiu ILEI proponis ĉi-jare du tekstojn: por komencantoj - la komencon de la teatraĵo "1910" de Ĵenja Amis, kiu parolas pri la vizito de Zamenhof al Usono kaj Kanado. Por progresintoj -  la rondirantan rakonton "Pri viroj kaj kunikloj", lanĉita de la nove restariĝinta Komisiono pri Virina Agado de UEA. Jen estas la ligilo al la teksto por progresantoj: https://www.ilei.info/novajxoj/Tago_de_la_EsperantaLibro2024.pdf

La teksto daŭre estas verkata pere de virinoj kaj ILEI proponas al dezirantinoj kontakti A.Madella-n.

La ligilo al la deklamado: https://www.youtube.com/watch?si=99EGeN-88tuVM6_A&v=obYBD-lRhKU&feature=youtu.be

**Premio La Torre**

El sep kandidatoj por la premio ses sukcesis sendi siajn finalajn laboraĵojn al la juĝkomisiono. Do, ni atendas la rezultojn.

**Porafrika agado**

ILEI pripensas manieron ekhavi bibliotekan centron en Burundo por helpi al afrikaj samideanoj el aliaj najbaraj landoj pri lernolibroj kaj aliaj bezonataj instru- kaj didaktikaj materialoj. Okupiĝas pri tio la estrarano Aimé Patrick Manirakiza

**Sekcioj**

En Burundo sukcese pasis la Esperanto-seminario, en kies organizado partoprenis la nova estrarano de ILEI Aimé Patrick Manirakiza. La evento  okazis la 20-an ĝis la 22-an de decembro 2024 en la Esperanto-centro en Rumonge. Partoprenis esperantistoj el Buĵumburo, Rumonge kaj Nyanza-Lac. La seminario estis speciala, ĉar la Burundaj seminarianoj mem financis la seminarion ekde la komenco ĝis la fino. Inter la agadoj de la tago estis:

• Elekto de Fraŭlino Esperanto en Burundo

• Ekzameno por komencantoj

• Ekskursoj

• Tradiciaj dancoj.

Jen la ligilo pri fotoj kaj filmetoj:

https://drive.google.com/drive/folders/14Wgzcv3rE3r6bC15EUzVd9-oS3CiSg-m?usp=sharing

La nova numero de ***Konga Stelo***: https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo Agrablan legadon deziras DKEJO kaj ILEI!

**Universitata agado**

La Universitato de Milano en Italio akceptis prezenton de Alessandra Madella pri la agado de la Esperanto-grupo de Parmo kaj la projekto "Saĝa Steleto" dum la konferenco kun la titolo " Difference, Diaspora, and the Nation: The Politics and Aesthetics of Minoritarian Performance in 20th and 21st Century Italy", kiu okazos en februaro 2025.

**Eldonado**

Eldonitaj Aktoj de Simpozioj de ILEI 2022-2023 jam alvenas al la aŭtoroj.

Survojas la preparado de la Antologio kun la plej valoraj artikoloj de IPR tra ĉiuj jaroj. La estrarano Fernando Pita kompilis grandan kolekton de la tekstoj kaj sendis ilin al la estraro por pritaksi.

La Estraro pritaksas ankaŭ eblojn por eldoni la libron de A.Madella pri la propedeŭtika valoro de Esperanto pere de l**a** Dokumenta Esperanto-Centro en Zagrebo, Kroatio, en la kroata lingvo (tradukis la estrarano Marija Jerković). Kaj ankaŭ en la korea lingvo.

**IPR kaj JA**

La skipoj de du revuoj subgvide de Jozefo Nemeth kaj Stano Marček diligente laboras por aperigi la revuojn. La kasistino Karine Arakeljan preparis novan, korektitan mendilon por JA. Vide ĉe: **https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf**

**Kunlaboro kun enmovadaj institucioj**

La 10-an de decembro 2024 en Montevideo, Urugvajo, okazis Internacia hibrida kunveno en la urugvaja parlamento, kie antaŭ 70 jaroj aprobiĝis la unua Unesko-Rezolucio pri kaj por Esperanto. La **o**rganizantoj de la solenta evento estis Urugvaja Esperanto-Societo, UEA, TEJO kaj ILEI, kiu subvenciis 270 eŭrojn por vojaĝigi junulojn. Jen la raporto de la Prezidanto Ahmad Mamduhi**: "**La 10-an de decembro 2024 la Esperanto-komunumo festos la 70-an datrevenon de la Rezolucio de Montevideo, grava mejloŝtono, kiu markis la unuan oficialan agnoskon de Esperanto fare de Unesko kaj la komencon de la oficialaj rilatoj de UEA kun tiu organizaĵo. Akceptita en 1954 dum la ĝenerala konferenco de Unesko en Montevideo, Urugvajo, ĉi tiu Rezolucio rekomendis al la ĝenerala direktoro de Unesko sekvi la evoluon de la uzo de Esperanto, agnoskante, ke la atingoj de la Esperanto-movado kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko.

Ĉi tiu sukceso estis rezulto de la persista klopodado de UEA kaj aliaj esperantistaj organizaĵoj, kiuj kvar jarojn pli frue prezentis al Unuiĝintaj Nacioj (UN) petskribon subskribitan de preskaŭ 900 000 personoj kaj reprezentantoj de ĉirkaŭ 500 organizaĵoj, postulante, ke UN esploru la lingvan problemon tutmonde kaj la eblan rolon de Esperanto en ĝia justa solvo. La petskribo estis transdonita al Unesko por konsidero - kaj la rezulto estis

malpli radikala, sed historia Rezolucio, kiu donis oficialan kaj konsultan statuson al la Esperanto-movado en Unesko.

Por festi ĉi tiun datrevenon, kaj sub la aŭspicioj de UEA, TEJO, ILEI kaj la Urugvaja Esperanto-Societo, stariĝis komisiono konsistanta el lokaj esperantistoj kaj reprezentantoj de diversaj institucioj de Ameriko. Ĉi tiu komisiono laboris por organizi internacian konferencon, kiu okazis la 10-an de decembro 2024, ekde la 9:00 loka tempo (12:00 UTK), en la Leĝodona Palaco (Parlamentejo) de Montevideo. La celebrado inkluzivis prelegojn kaj prezentojn ĉeestajn kaj retajn, ekspoziciojn de dokumentaj filmoj kaj artajn prezentaĵojn. La evento estis malferma al la publiko, kiu povis ĝin ĉeesti persone aŭ partopreni rete".

**Kun UEA**

ILEI estis prezentita dum la Virtuala Kongreso en novembro. Okazis tri prezentoj: du pri ILEI (unu dum KonSciu de TEJO) kaj prezento de la Aktoj de la Simpozio. Gvidis la prezentojn la Prezidanto Ahmad Reza Mamduhi kaj la vicprezidantino Alessandra Madella. Aranka Laslo prezentis organizon kaj planojn de la 58-a Kongreso de ILEI.

**Kun TEJO**

La Estraro kune kun TEJO preparas la Internacian Esperanto-Kurson en la angla cele al IJK.

**Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj**

**Kun FIPLV**

Aperis nova artikolo de A.Madella en la bulteno de la Internacia Federacio de la Instruistoj de Vivantaj Lingvoj: https://fiplv.com/news/fiplv-newsletter/

La estrarano Aimé Patrick Manirakiza organizis kunvenon kun la ministrino de Burundo pri Solidareco kaj Homaj Rajtoj, kiu alparolis al la Esperantista Mondo. Tio malfermas novan paĝon pri konscio kaj enpenetro de Esperanto en Burundon. Jen la prelego de la ministrino: https://drive.google.com/file/d/1cccnv1E9C1MjW-WrP3NV1DEkGvJwW7Du/view?usp=sharing

La filmeto estas alŝutita al la Jutuba kanalo de ILEI: https://youtu.be/r0M5bOW0eQ8

**Kunlaboro kun Ĉina Radio Internacia**

En la platformo de CGTN aperis la rondiranta rakonto "Pri viroj kaj kunikloj":

https://esperanto.cgtn.com/2024/11/29/ARTI1732845798798215

**Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI: Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI: Ahmad Reza Mamduhi

2025-01-15